



KOMITATO de 07-a de septembro 2026

Lundon la 7an de septembro 2026 kunvenis la komitato de Espéranto-France de la 19a00 ĝis la 21a30 pere de Zoom.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

PERSONA NOMO	FAMILIA NOMO	MALLONG.	KOMITATANECO	ELEKTO *	ĈEESTAS	SENKULP.	FORESTAS	RAJTIGAS
Raymonde	COQUISART	RC	Repr. de la membraro	23/25	R			
Dominique	COUTURIER	DC	Repr. de la membraro	2026			X	
Régis	FABRE	RF	Repr. de la membraro	23/25	R			
Xavier	GODIVIER	XG	Repr. de la membraro	23/25	R			
Aleks	KADAR	AK	Repr. de la membraro	25/26	R			
Michaël-Boris	MANDIROLA	MBM	Repr. de la membraro	22/24/26	R			
Sébastien	MONTAGNE	SM	Repr. de la membraro	23/25			X	
Marcelle	PROVOST	MP	Repr. de la membraro	23/25	R			
Bruno	ROBINEAU	BR	Repr. de la membraro	23/25	R			
Viktoro	SIMONNET	VS	Repr. de la membraro	2025	R			
Gilles	TABARD	GT	Repr. de la membraro	2026	R			
Bertrand	VERSTRAETE	BV	Repr. de la membraro	2025		X		
Jean-Luc	THIBIAS	JLT	Repr. de fed. France-Est		R			
Pierre	GAUTHIER	PG	Repr. de fed. Paris-Île-de-France		R			
Isabelle	NICOLAS	IN	Repr. de fed. Limousin		R			
Xavier	DEWIDEHEM	XD	Repr. de fed. Hauts-de-France			X		
Claude	BENSIMON	CB	Repr. de fed. Bretagne		R			
			Repr. de fed. Poitou-Charentes					
Thierry	SPANJAARD	TS	Repr. de fed. Provence		R			
			Repr. de FET					
Benoît	ENTE	BE	Repr. de FKEA		R			
Didier	JANOT	DJ	Repr. de GEE / ÎLEI-Francio		R			
Briac	MILLON	BM	Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes		R			

17 ĉeestis el 21, 2 senkulpiĝis, 2 forestas, 0 donis povon
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.1 Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

5 min

0.2 Elekto de prezidanto kaj protokolanto

1 min

XG prezidas, VS kaj MP kunprotokolas

0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj

5 min

0.4 Dato de la venonta kunsido

4 min

surloka kunveno : 17a de oktobro : laborkunsido

18a de oktobro de la 10-12 kaj 14-16 surloke aŭ rete.

Benoît Ente ne estos libera la 18a matene.

4 min.

1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 Informo pri la estraro

DISKUTO 5 min

XG kontaktos Dominique-n Couturier-n ĉar ŝi neniam partoprenis la kunsidojn. Do ĉu ŝi ricevas la informojn ? invitojn ?

La ligilo al nia reto por registri novajn kursojn en la diversaj departamentoj ne funkcias. TS sendas mesaĝon al Emmanuelle Richard.

Dankal ĝisdatigo de la sistemo de nia servilo (Debian/PHP ktp), pluraj problemoj malaperis por niaj dissendlistoj. XG sendos mesaĝon por klarigi kiel uzi la diversajn ilojn kaj aliri al arkivoj estinte konektita.

1.2 Nova aliĝilo 2026-2027

DISKUTO 10 min

Negravaj ŝanĝoj faritaj en la lastjara aliĝilo : forigo de la linio pri donaco por "salon de l'Éducation", partopreno de liceanoj al EEK anstataŭ vojaĝo tra Eŭropo.

DJ proponas ke linio estu aldonita por peti donacon por subteni la kunvenon ĉe UNESCO dum 2027 (140-a datreveno de Eo).

Aldono de iu tabelo por ke ĉiu aliĝanto povu kalkuli la sumon pagotan al Esperanto France laŭ la elektoj faritaj.

Sendi al la komitato provversion de la aliĝilo por komentoj.

1.3 Strategio kaj laborplano de la nova komitato

DISKUTO 10 min

-Daŭrigo de laboro por helpi lokajn asociojn (kalendaroj kiel kutime kaj plie: LME kaj faldfolioj disdoneblaj)

-Laboro pri sociaj retoj (kunveno dum UK: vere malfacile, plano starigi laborgrupon. Lu Wunsch-Rolshoven konstatis ke ni estas tre malefikaj ĉar necesas publikigi aferojn ĉiusemajne, ege temporaba. Ĉu ni kapablas pere de teamo aŭ dungi profesiulon?) Propono starigi lingvoskale laborgrupon ĉar ebleco labori por francparolantoj. Se ni dungos iun, ni devas klare difini kion ni celas (diskonigi Eon, allogi homojn al niaj grupoj, kursoj, asocio). Atingi kaŝitajn esperantistojn.

Konstato ke ni multe laboras por redakti enhavojn (LME, Esperanto-aktiv, ktp) kiuj ĝis nun estas sub-uzataj ĉar nur per retmesaĝoj kaj retejo. Tiu riĉa enhavo povus servi por nutri fluojn en sociaj retoj. Sed necesas homoj specife spertaj pri tiu laboro.

2. KONSOCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : flugfolio presita

DISKUTO 5min

Eblas mendi 50 senpage por asocioj (kaj pli se necese)

2.2 Kalendareto 2027 presota

DISKUTO 5 min

40 000 menditaj kiel lastan jaron, alvendato ĉirkaŭ la 15a de septembro en la sidejo

2.3 Trejnad-sesioj

INFORMO 10 min

Pierre Dieumegard (sept ?). Prelegeto jam registrita de XG. Indos plani alian por atingi pliajn aktivulojn de lokaj asocioj.

Massimo Ripani (sept-dec) proponas 4 sesiojn. 1a: mardo la 22a de septembro je la 18a 30

Dennis Keefe (okt aŭ januare). MP por kontakti denove Dennis.

2.4 Sociaj retoj - strategio

INFORMO 15 min

Vidu la paragrafon 1.3

2.5 Uzo de Eventaservo

INFORMO 5 min

luj kluboj uzas ĝin sed aliaj ne. Se via asocio ne komunikas per ES, eksterlandaj esperantistoj ne vidas viklecon de tiu loka asocio. Ebleco proponi trejnadon. (AK: Pri Eventa Servo Yves Nevelsteen certe volonte

2.6 Partopreno al Homara festo

INFORMO 5 min

Oportuno por disdoni la kalendaretojn. 3 aŭ 4 deĵorantoj ĉiutage. 11 deĵorantoj por la tuta periodo. Said deĵoros ĉiutage, Marianne unu tagon. Ĉeforganizanto, kiel en 2025: Vilĉjo

2.7 Komunikilo de UEA pri paco

INFORMO 5 min

GT tradukis la komunikilon kaj sendas al XG por aperigo en nia retejo (helpe de Emmanuelle Richard laŭbezone).

3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 *Le Monde de l'Espéranto*

DISKUTO 5 min

Eldonita kaj dissendata. Ĉiu loka asocio povas peti sendon. Iu eraro ankoraŭ ekzistas sur la kovrilpaĝo. Korekti la pdf-an dokumenton. CB pretas publikigi ĉe la reto.

3.2 Esperanto Aktiv

INFORMO 5 min

Estantaj planoj : fino de oktobro. RC demandas al la grupoj artikolojn pri la budoj dum la asoci-tago en diversaj regionoj. Du intervuo eblaj

3.3 Kongresoj 2027, 2028 kaj 2029

DISKUTO 15 min

Eŭropa kongreso 2027 en Carry-le-Rouet apud Marseille.

Diversaj demandoj pri la organizo de la venonta kongreso. Jam alvenis proponoj de muzikistoj kaj prelegantoj.

- buĝeto preskaŭ finita
- partneroj : EEU, EAB, FEI, Esperanto Bruselo, VESPO, Eble GEA ĉar ĝi ŝanĝis la daton de sia kongreso. Eo Katalunio ne deziras ke ni pagu la muzikistgrupojn.
- Ĉu ni povas havi diservon dum la kongreso ? Mesaĝo al TS de BE
- Propono de IN : biografio fabelo (pri LLZ aŭ alia)
- JEFO cerbumas pri junula programo kun GEJ kaj KEJ kun 2a fazo de projekto subvenciita de OFAJ. TS rediras al ĉiuj ke por ĉiu propono, estus bone sendi al Esperanto Provence la proponon uzante la formon kiu estos en la aliĝilo.
- La hotelo havas 350 kuŝlokojn. Momente 200 rezervitaj al kongresanoj. TS vidas laŭ alvenoj de aliĝiloj ĉu sukcesas. Eblas partopreni laŭtage kun tagmanĝo.
- Propono : ĉu Eo France povas subvencii ĉiun junulaliĝon ? po 30 eŭroj ? TS repondos antaŭ la posta tago 4a posttagmeze. EF povas aparte subvencii vojaĝkoston de francaj junuloj.
- presi 1000 aliĝilojn por kunporti al la sidejo de EF (cele al sendo al ĉiuj membroj kaj sendo de staketo al ĉiuj lokaj asocioj)

Kongreso 2028 organizota de Norda Federacio. Firma respondo pri kongresejo ne estas havebla nuntempe. XD respondos baldaŭ al RC pri la temo.

Kongreso 2029 : liston de eblaj kongresejoj en la Francilia Regiono ricevos RC. Necesas denove peti la informon al la persono kiu promesis sendi sed ne sendis.

3.4 Arkivoj kaj bibliotekoj

INFORMO 5 min

sekvo de projekto de katalogo de ĉiuj esperantaj bibliotekoj tra la mondo kaj subvencipetoj. Indus enplekti UEA, kiu havas strategian [agadon pri bibliotekoj](#), kun subteno de ESF

3.5 Kolokvo "Espéranto – 140 ans : ceci n'est plus un projet" (2027)

INFORMO 5 min

<https://shesl.org/2027-esperanto/>

Konigi la eventon. Ĉu ni mem organizu ion okaze de la 140 jaroj?

4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj.)

4.1 Ekzamenoj

INFORMO 2 min

Informi pri datoj de venontaj ekzamenoj.

4.2 Metodo 12

INFORMO 2 min

En progreso. Por la progresantoj.

PG opinias ke unua leciono de Metodo 11 iom malfacila por veraj komencantoj. Sia/ŝia enkondukita en 2a leciono. Akuzativo venas poste.

Fino: 21h30.